

Novaĵo!
En la aŭtuna katalogo de L. Nelson "Värends bär- och trädgårdsforum" anoncas bulbojn de **Esperanto-tulipoj.** Mendonumero: 40190; 6 tulipoj / 38:70:-.
Se vi volas planti Esperanto-tulipojn en via ĝardeno, jen la telefonnumero: 0477-21083.

Solvo de la krucvortenigmo, *inter-LIGILO* 3:95

1 I	2 N	3 T	4 E	5 R	6 L
7 H	U	R	8 L	I	I
9 P	R	O	10 L	O	G.
11 R	A	T	12 A	13 Ĝ	I
I	14 B	O	R	15 I	L.
N	16 T	E	M	17 P	O

Ĉiumarde loka kunveno en nia klubejo je h 19.oo-21.oo
Varje tisdag sammanträde i vår lokal kl. 19.00-21.00

*

Internacia Festivalo
27 dec 1995 - 3 jan 1996
en Rotenburg.
Legu la separatan informilon.
Aliĝiloj troviĝas en nia Esperanto-Centro Masthuggslide 1.

Hallå – hallå!!!
Du har väl köpt Ditt exemplar av ***Esperanto rörelsen i Göteborg*** *1892–1992? Om inte -- skynda på!* ➔ *till vår klubblokal för att köpa.*

Membrogazeto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo, *inter-LIGILO*.
Ne-membroj povas aboni ĝin kontraŭ 40 kronoj. Poŝtgiro: 4 36 12-1 kun la noto "Por la inter-LIGILO".

Responda eldonanto: Aira Kankkunen, Tel +fakso: 031-18 79 82

Redaktantoj: Aira Kankkunen; Christer Lörnemark, 031/41 26 5, retpoŝto: Christer.Lornemark@mailbox.wca95.org. Andreas Nordström, Tel: 031-52 59 72; Fredrik Olofsson, Tel:031-19 84 49

Adreso: Masthuggsliden 1, **413 18 Göteborg;** Tel : 031-12 05 94

N-ro 3:95

***inter-*LIGILO**

Esperant**O**

Aŭtuna renkontiĝo

la 26an de septembro
je la h. 19 –21
en Esperanto–Centro de Gotenburgo
Masthuggsliden 1

Tema vespero
Agadoj de 50-jara UN: Eje Nilsson
Monda Kunagado : Märtha Andréasson
TEJO – tutmondaj kaj naciaj rilatoj: Ralf Fröhling
Kafo kun kukoj
en agrabla akompanantaro

Bonvenon!

Karaj geleganoj!

La belega somero estos baldaŭ nur memorajo. Nun ĝi preparas vojon por la venonta aŭtuno, kiu jam sendis siajn unuajn salutojn; tabloj de vendoplacoj svingiĝas pro somera rikoltajo, eĉ nordaj grenkampoj flavkoloriĝis, kaj en nia hejmurbo kelkaj el verdaj foliarboj jam ornamis sin per rostkoloraj aŭtunaj adiaŭvestoj.

La pasinta somero enhavis memorindan eventon, la UK-n en Tampereo, unu el la plej grandaj. Multaj el ni ĉeestis kaj ili, al kiuj ne eblis partopreni, povis kaj povos pere de radioelsendoj de Pola Radio sekvi kongresajn programerojn. Oni jam skribis kaj skribos multe pri la kongreso en diversaj E-gazetoj. Pro tio mi ne ripetas aferojn, tamen mi volas mencii pri unu el miaj plej fortaj sentoj dum la kongreso: La internacia lingvo, Esperanto, bonege taŭgas kiel ilo por prezenti, diskuti kaj skribi pri iu ajn temo de ĉiutagaj aktualajoj ĝis belarta literaturo kaj altnivelaj sciencaj temoj. Ni – esperantistoj – havas respondecon por vastigi ĉi tiun scion. Ni havu ĉi tiun celon en niaj agadoj, eĉ en niaj simplaj renkontiĝoj. Ni subtenu SEF-n, nian landan organizon, kaj UEA-n, nian unuigan organizon, por ke ni havu eblecojn daŭrigi diversnivelan kaj mondvastan laboradon de La Internacia Lingvo, Esperanto.

Mi deziras all ĉiu leganto/-ino bonegan Esperanto-semestron!

Aira.

Kära läsare!

Vår vackra sommar är strax endast ett minne. Den bereder redan vägen för den kommande hösten, som håller på att sända sina första hälsningar; torgborden gungar under sommarens rikedomar, skördefälten även i landets norra delar har fått sina gula färger och en del av vår hemstads lövträd har redan smyckat sig med höstens rostbruna avskedskläder.

Denna sommar gav en minnesvärd händelse, esperantokongressen i Tammerfors. Många av oss var där. De, som inte kunde delta i kongressen, kunde och kan fortfarande följa program via Polska Radios e-sändningar. Man har skrivit och man kommer att skriva mycket om kongressen i e-tidningar. Jag vill nämna endast om en sak, för mig den största känslan under kongressen: Esperanto är ett utmärkt språk, ett vertyg för att meddela och diskutera om varje slags ämne, från vardagliga händelser till skönlitteratur och vetenskapliga ämnen på hög nivå. Vi – esperantister – bär ansvaret för att denna vetskap sprider sig ännu mer. Låt oss ha detta som mål i vårt arbete, även under våra enklaste klubbträffar. Låt oss stödja vår landsorganisation SEF och vår världsorganisation UEA, för att vidare utveckla och arbeta för Esperantos spridning på olika ämnesområden över hela världen.

Jag önskar alla läsare en riktigt god esperantotermin!

Aira

*

80-a Universala Kongreso de Esperanto Tampereo 22-29 julio 1995

Nun ankaŭ la 80a UEA-kongreso estas historio. Ĝi okazis en Tampereo en Finnlando kaj la juĝo pri ĝi estas: "Unu el la plej bonaj kongresoj, kaj organize kaj programe, kaj rilate la agrablan traktadon ricevitan de ĉiuj funkciuloj."

Ĉ. 2500 partoprenantoj

ĝuis la preskaŭ ĉiam belan veteron, se ili ne vagis tra la bela kongresa halo aŭ ie sekvis prelegojn, diskutojn, kursojn, spektis teatrajojn aŭ sidis babilante, kafumante aŭ bierumante kun geamikoj.

"Ni, la popoloj" – unu mondo aŭ disaj eroj?

estis la kongresa temo kaj sufiĉe multajn programerojn oni dediĉis al ĉi tiu temo, ekz. serion da prelegoj, diskutoj ktp.

190 programeroj + ĉiuj ekskursoj.

Ne estis facile elekti inter la multaj diversspecaj ofertoj. Ankaŭ ne estas facile mallonge skribi raporton pri la tuto. Iĝas nur superrigardo. Pri detaloj vi povas legi pli multe en *La Espero, Heroldo* kaj *Esperanto*, aŭ auskulti la elsendojn de Pola Radio.

Märtha

*

80-e Esperantovärldskongrssen Tampere 22-29 juli 1995

Nu är också den 80e UEA-kongressen historia. Den ägde rum i Tampere i Finland och omdömet om den är: "En av de bästa kongresserna, både vad gäller organisation och program och trevligt bemötande från alla funktionärer."

Ca 2 500 deltagare

njöt av det nästan ständigt vackra vädret, om de då inte strövade genom den fina kongresshallen eller följde föreläsningar, debatter, kurser, såg på teater eller satt och drack kaffe eller öl och pratade med vänner.

"Vi, folken" – en värld eller åtskilda delar?

Det var kongressens tema och ganska många programpunkter ägnade man det här ämnet, t.ex. en serie föredrag, diskussioner, osv.

190 programpunkter + alla utflykter

Det var inte lätt att välja bland de många olikartade utbuden. Det är inte heller så lätt att kort rapportera om det hela. Det blir bara en översikt. Om detaljer kan ni läsa mer i *La Espero, Heroldo* och *Esperanto* eller lyssna på utsändningarna i polska radion.

Märtha

❋

Renkontiĝoj dum la somero

Kompreneble la Esperantistoj ne tute ripozis en la somera varmo. Kelkaj renkontiĝoj okazis: en Liseberg 30 junio; 2 julio kun du eksterlandaj Esperanto-parolantaj familioj, Svenonius kaj Kotevikova, en Esperanto-Centro kaj en Slottsskogen. 16 julio vizitis nin la membroj de la Nederlanda muzikgrupo Kajto. Aliaj gastoj dum la someroj estis Gérard kaj Henryka el Montpellier (Francio) 10 julio; 20 julio Beannacht Daithu el Irlando, kaj Bill Mak el Kanado kaj Hongkongo; kaj 22 aŭgusto Somekawa Takatosi el Japanio. Kelkaj gastoj venis neanoncite; pri Kajto kaj la Japana vizito sendiĝis alvoko per Rapida Informilo.

4 julio 13 Esperantistoj ekskursis al Tahult ekster Landvetter, kie la Nilsona Fonduso posedas terpecon de la iama havaĵo de E. S. Nilsson. Simila ekskurso okazis lastjare, kaj ni esperas fari el ĝi tradicion. La partoprenantoj piknikis en la arbaro, spitante la kulojn, kaj poste inspektis la teron. La tiea "Esperantujo" konsistas el tri partoj, arbaj kaj parte marŝaj. (La advokato prizorginta la dividon de la heredaĵo partigis la teron tiel, ke restis tri terpecoj neuzeblaj por la plej multaj celoj. La loka Esperanto-Movado ricevis 1000:- en 1975 por ke ĝi akceptis posedi tiujn terpecojn.)

Lastjare la Esperantistoj metis ujon en la teron, en kiu ĉiu partoprenanto metis 5 kronojn. Tian kontribuon ni faris ankaŭ ĉi-jare. Eble ĝi iam kreskos al trezoro.

Christer

❋

Librovendado en Södra Larmgatan 26 aŭgusto

Esperantistoj partoprenis la publikan librovendadon en Södra Larmgatan, aranĝita de *Malnovalibrejo Styrbjörn Öhman AB*. Estis okazo informi pri Esperanto kaj pri ĝia literaturo. La preterpasantoj povis vidi, ke jes ekzistas kaj vendeblas libroj en Esperanto, kaj ke troviĝas ĉ. 580 Esperanto-libroj en la Urba biblioteko. Vendiĝis i.a. ekzempleroj de la lernolibro "Allas andra språk" de William Auld; "Esperanto-rörelsen i Göteborg 1892–1992" kaj libroj de Aira Kankkunen.

❋

Traduka ekzerco

Gajnintoj de la traduka konkurso en *inter-LIGILO* 1995:1 estas **Dolly Carlsson** kaj **Gustav Larsson**. Pri alternativaj tradukoj vin turnu al Christer Lörnemark.

Jen nova teksto por traduki:

Odlade hasch på polishusets tak

Polisen i den italienska staden Udine upptäckte på fredagen att polisstationens tak utgjorde grogrund för en haschodling.

Poliserna hade under en längre tid noterat att någon odlade något på taket men de hade inte bekantat sig närmare med växterna. Men när plantornas ägare hoppade ut genom sitt fönster och ned på taket för att med saxen i högsta hugg skörda sin sådd reagerade polismännen. Efter en närmare titt visade sig växterna vara indiska haschplantor.

De två unga trädgårdsskötarna hade glömt att kontrollera vilka hyresgäster som dolde sig under taket.

GT/Idag 950820 (TT-AFP)

❋

Informoj kaj anoncoj

Novaj tekstoj kaj anoncoj por inter-LIGILO 4:95 estu ĉe la redaktantoj la 6-an de oktobro.

Arbetsgruppen för inter-LIGILO samlas nästa gång den 10 okt. kl 19.00

❋

Esperantokursoj:

Por komencantoj: 3 x 8 horoj:
sab. la 7an de okt. , *dim.* la 8an de okt., *sab.* la 14an de okt.
je la h.09.30–16.30.
Loko: Molinsgatan 7.
Instruisto: Ralf Fröhlich
Kurskotizo: 350:- ekskl. lit.

Postelementa kurso:
ekde merkr. la 13an de sept.
je la h. 14.00
(laŭbezone oni povas ŝanĝi la tagon kaj la horon)
Kurskotizo: kursliteraturo
Loko: Masthuggsliden 1
Instruisto: Märtha Andréasson
tel: 031– 57 11 33.

Konversacia rondo:
ekde merkr. la 13an de sept.
je la h. 11.00
Kurskotizo: literaturo
Loko: Masthuggsliden 1
Kontaktpersono: Aira Kankkunen
Tel./faxo: 031–18 79 82

❋

Esperantokurser

Nybörjarkurs: 3 x 8 tim.
lö. 7/10, *sö.* 8/10, *lö.* 14/10
kl. 09.30–16.30
Kursavgift: 350:- exkl. litt.
Plats: Molinsgatan 7
Lärare: Ralf Fröhlich

Fortsättningskurs
fr.o.m. *onsd. den 13. sept. kl. 14.00.*
(Vid behov kan dagen och tiden ändras)
Kursavgift: litteratur
Plats: Masthuggsliden 1
Instruisto: Märtha Andréasson
tel. 031-57 11 33

Konversationsgrupp:
fr.o.m. *onsd. den 13. sept.*
kl. 11.00
Plats: Masthuggsliden 1
Kursavgift: litteratur
Kontaktperson: Aira Kankkunen
Tel/fax: 031-18 79 82

❋

* *Nepagipovaj landoj: specialaj kondiĉoj !* *

KOTIZO	ĝis 30.09.95	ĝis 30.11.95	poste
jaroj -> 2	-	-	-
3 -> 13	190 DM	200 DM	220 DM
14 -> 24	290 DM	310 DM	340 DM
pli ol 25	390 DM	420 DM	460 DM

KOTIZO -> entenas loĝigon, programon, manĝojn por
DM/DEM tuta semajno (inkl. silvestran bufedon)

RABATO -> en formo de bonskribo >bileto pri bonhavaĵo< por uzo en nia gastejo KNAJPO:

frutempa aliĝo ĝis 30.06.95, popersone:	20 DM
ne-enloĝantoj de Germanio, pli ol 25 j.:	20 DM
ne-enloĝantoj de Germanio, 3 - 24 jaroj:	10 DM
infanoj, 3 - 5 jaroj:	10 DM
abonanto de >*EVENTOJ*< en la jaro 1995:	10 DM

EKSKURSO al Hamburg, aldona pago inkl.de tagmanĝo: infanoj 3 - 13 j.: 20 DM, aliaj: 25 DM

Laŭ propono de partoprenintoj ni iniciatis FONDUSON por subvencii IF-partoprenantojn el nepagipovaj landoj. Ni anticipe dankas pro via financa subteno resp. rezigno pri honorario (volu noti vian porfondusan donacon).

Subvenciojn kaj stipendiojn ni donas al partoprenantoj el reformaj kaj nepagipovaj landoj laŭ la eblecoj de supre menciita FONDUSO, partoprennombro kaj programkontribuo. - Sendu detalajn informojn.

INTERNACIA FESTIVALO

INTERNACIA FESTIVALO

la jarfina aranĝo por vi **12-a** **IF**

27 dec 1995 — 3 jan 1996

por personoj 25—55 jaraĝaj kaj junaj familioj

ROTENBURG (Germanio)

(inter Bremen kaj Hamburg)

Internacia Festivalo prezentas specifan programon por la "dua generacio" (mezaĝuloj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj. IF okazas sub profesinivela gvido kun internacia teamo. Bonvolu atenti, ke IS, junulara aranĝo de GEJ, okazas samtempe, sed ne samloke.

Ni elektis agrablan klerigejon en norda Germanio, en trankvila regiono periferie de urbo, tamen la centro estas en distanco de nur 2 km - vi havos 20-minutan promenon kaj konatiĝos kun ĉarma kaj tipe nordgermana urbo kun 20 mil enloĝantoj. La ejo disponas pri unu-, du- kaj kvarlitaj ĉambroj. Unulitaj ĉambroj nur por tuttempa partopreno.

Rotenburg (Wümme) estas bone atingebla aŭtostrate kaj fervoje. En la urbo estas trajnstacio, internacilinie vi ŝanĝu en Bremen aŭ en Hamburg; alvantage ni aranĝos "transportan servon". Distancoj al aŭtostratoj Bremen/Hamburg, Hannover/Bremen 20 km; al urboj: Bremen 45 km, Hamburg 75 km.

INTERNACIA FESTIVALO

Kadra temo: > naturkuracado <

Sub la kadra kaj aliaj temoj okazos prelegoj kaj diskutrondoj. Krom altnivelaj prelegoj vi ĝuos ankaŭ distran programon: kursojn (lingvajn/manlaborajn), promenojn, vizitojn, dancojn, ktp.

Celo de tuttaga aŭtobusa ekskurso estos la 75 km distanca HAMBURG, mondkonata kaj dua plej granda urbo en Germanio; konatiĝu kun ĝia haveno kaj belega centro - sub gvido de hamburgaj esperantistoj.

Allogos vin interesa kaj ĝuinda vespera programo kaj tradicia Silvestra Balo kun granda Silvestra Bufedo! Nia etosoplena Esperanta Gastejo >KNAJPO< (ĉifoje kun diskoteka ebleco) jam famiĝis inter la lastjaraj partoprenintoj kaj denove atendos vin...

IF alparolas flue parolantajn geesperantistojn, sed por komencantoj (ekz-e via partnero) ni antaŭvidas lernigajn kaj paroligajn kursojn. - Por viaj infanoj estas specialaj eblecoj: ili ĝuas apartan porinfanan programon kaj prizorgadon. Infanoj sub 3 jaroj estas senkotizaj, sed gepatroj mem zorgas pri ili.

Aliĝkonfirmilon resp. 2an kaj 3an Informilojn (kun pli detalaj informoj pri alveno) vi ricevos post aliĝo. La antaŭpago (popersone min. 50 DM/DEM) estas parto de la kotizo. Partatempaj pagoj nur laŭ kompletaj tagoj (komenco egalas, ekz-e, komenco per vespermanĝo, la tagkompleto finiĝas alian tagon post tagmanĝo). Atentu, ke partatempulojn (sub 4 tagoj) kaj pliaĝulojn (sen partner/ino en IF-aĝo) ni akceptos nur, se estos liberaj lokoj.

INTERNACIA FESTIVALO

INTERNACIA FESTIVALO

Adreso de la organizanto - kaj pagmaniero:

Hans-Dieter Platz (HDP)
Postfach 1148
DE-34303 NIEDENSTEIN
ermanio
telefono:int+49-5624-8007
telefakso:int+49-5624-322
(Germanio: 05624 + numero)



germana poŝtĝirokonto:
91856-676 Ludwigshafen
je nomo H.D.Platz

BELGOJ povas pagi ankaŭ al:
Flandra Esperanto-Ligo (FEL),
poŝtĝirokonto: 000-0265338-43
(kun indiko: 12-a IF)

Ni akceptas ankaŭ eŭroĉekojn aŭ kontantan valuton (sed sendu ĝin nepre en registrita koverto); resp. se estos paga problemo, skribu, por trovi solvon.

Kelkaj komentoj pri lastjara(j) IF:
Prof. Amri Wandel, Israelo:
"estis vere belega IF - kiel ĉiam"
D-ro Winfried Schumacher, Germanio (pri KNAJPO):
"la variegaj ofertoj da manĝaĵoj kaj ĉefe trinkaĵoj superas eĉ profesiajn trinkejojn"
Familio Gabalda, Francio:
"dum IF oni multe klerigas, amuziĝas kaj malstreciĝas"
Abdurahman Junusov, Rusio:
"la vintra fabelo, mi ŝatus venadi ĝin ĝis 100-jaroj"

... kaj enketa rezulto de 11-a IF:
pli ol 75 % volas denove ĉeesti. Ĉu ankaŭ vi?